**CIONISMO KAJ ANTISEMITISMO.**

verkita de *Éric Bernard COFFINET* (ebcoffinet.fr)

la 10an de septembro 2025

Ĉu esti anticionisto (kontraŭ la cionismo) similas al esti antisemitisto (kontraŭ la judoj)?

Unue bonvolu noti, ke la cionistoj plejparte ne estas judoj kaj ke multaj judoj estas kontraŭ la cionismo !

Laŭ Vikipedio, "la cionismo historie estas movado naciisma kaj etnisma cele al politika aŭtonomeco de la juda popolo per estigo de juda hejmo nacia en Palestino". Ĝi estas projekto tipe koloniisma de la 19a jarcento, kiun elpensis eŭropaj judoj ofte nereligiaj kaj politike maldekstrulaj. Nur poste ĝi fariĝas "mesianismo" konforma al bibliaj skribaĵoj por pli forte pravigi ĝin. Ekde sia origino la cionismo vekas oponadon de multaj judoj, tiel sekularaj kaj nacie asimiliĝemaj, kiuj kritikas la nocion de "juda popolo", kiel religiaj kiuj konsideras malreligia la perfortan revenon de la juda popolo en la Sanktan Landon antaŭ la mirakla alveno de sia Mesio.

Male la cionismo de la anglo-saksaj protestantoj estas religia ekde sia apero dum la 17a jarcento. Laŭ bibliaj profetaĵoj la reveno en la Sanktan Landon de ĉiuj judoj dispelitaj tra la tuta mondo estas nepre necesa etapo antaŭ la reveno de Jesuo-Kristo. Nur poste la anglo-saksaj potencoj vidis en la plenumo de tiu cionisma projekto oportunon por daŭre estigi malkonkordon en Mez-Oriento kaj sekve akapari ĝian "nigran oron". La eksterordinara potenco financa kaj politika de tiuj cionismaj movadoj anglo-saksaj kaj religiaj en Usono klarigas la ĉiaman apogon de ties sinsekvaj registaroj favore al la ŝtato de Israelo, kion ajn ĝi faras!

Sed fakte, tiuj anglo-saksaj protestantoj cionistaj estas iel antisemitaj, ĉar ili utiligas la judojn damaĝe al ili por la efektivigo de sia mesianisma plano pri la reveno de Jesuo-Kristo kaj la surtera starigo de la Regno de Dio, ne juda sed kristana... Kaj la juda cionismo estas ankaŭ iel kontraŭjuda, ĉar ĝia projekto mesianisma de juda ŝtato por la judoj de la riverego Nilo ĝis la riverego Eŭfrato kun "sklavigo" de la tieaj semidaj popoloj nejudaj estas mistika deliro damaĝe al la judaro kaj praktike nerealigebla.

Do, laŭ mia opinio, esti anticionisto ne similas al esti antisemitisto. Tio estas ne rasismo kontraŭ la judoj sed oponado al politika projekto rasisma, superregisma kaj koloniisma el epoko por ĉiam forpasinta, kiu paradokse malutilas al la judoj mem kaj kiu la tutan homaron grave endanĝerigas nun...